

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

Cabra
(Kordovo)

38-a Jarkolekto - Junio 2024 - N-ro 133

Aprilo / Junio 2024

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
P. 07 Andaluzio videbla el la spaco.
P. 09 Lingva Angulo:
La preposición "ĉe"
P. 15 Poezia Angulo.
P. 16 Nuntempa Vortaro:
Kiel agadi okaze de pneŭa trapikiĝo.
P. 21 Folioj por Praktikado.
P. 28 Turismi en ... Cabra (Kordovo)
P. 32 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *Pola sciencisto en la Sevilla foiro - 1933.*
P. 34 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
Kioma horo estas... sur la Luno?
P. 36 Flamenko: *La faruko.*
P. 38 Fervojista angulo: *La fervoja muzeo de La Roda de Andalucía.*
P. 40 Komikso: *La viro sur la sarkofago de la mumio.*
P. 45 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.
P. 47 Ŝako: *La mato de Legal.*
P. 49 Andaluzia kuirarto: *Porra de Antekero kun oranĝoj*
P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *La stelo de la deziroj en la Moskeo de Kordovo.*
P. 52 Vorto-ludoj.
P. 54 Humuro

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:

José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante



Sur la kovrilo:

Strato en Cabra (Kordovo)

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Sevila Esperanto-Asocio invitita al la omaĝo al Blas Infante

Ĉi-jare denove, Sevila Esperanto-Asocio estis invitata de la organizantoj partopreni en la omaĝo al Blas Infante, tiam oni memoras la Patron de la Andaluzia Patrujo, kiu ankaŭ estis esperantisto. La Prezidanto kaj la Sekretario de la sevila asocio ĉeestis la akton kaj ili lasis flor-faskon apud la monumento al la andaluzia politikisto, starigita ĝuste sur la loko kie li estis mortpafita en aŭgusto 1936, en la komenco de la civila milito.

Informoj pri ĉi tiu omaĝo amplekse aperis en la andaluzia televido kaj en sevilaj ĵurnaloj.



Reprezentantoj de Sevila Esperanto-Asocio ĵus liveris flor-memoron antaŭ la monumento al Blas Infante.

KURSOJ DE ESPERANTO EN SEVILO 2024 - 2025

En la monato oktobro komenciĝis du kursoj de esperanto en Sevilo, organizitaj de Sevila Esperanto-Asocio kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ĉe la municipa kultur-domo "Casa de las Sirenas", en la *Alameda de Hércules*, okazas kurso merkrede de 19:30 ĝis 21:00 horoj; kaj en la Fakultato de Turismo kaj Financoj, Avenuo San Francisco Javier, lunde de 18:00 ĝis 20:00 horoj. Ĉi tiu kurso estas agnoskita de la Universitato de Sevilo kun 6 kreditoj por la lernantoj.




APERIS NOVA NUMERO DE *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio, kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, ĵus aperis la numero 23-a de la revuo *Jura TRIBUNO INTERNACIA*, la sola en esperanto kiu pritraktas nur jurajn aferojn.

Ene de ĉi tiu numero aperas centra artikolo pri Tutafrikaj Tribunaloj, de la portugala advokato Miguel Faria de Bastos, temo pri kiu li prelegis okaze de la Universala Kongreso en Tanzanio en aŭgusto 2024. Sur la revuo ankaŭ legeblas informoj pri juraj temoj kaj pri la vivo de la jurista Esperanto-asocio mem. Pliaj informoj pri Internacia Jurista Esperanto-Asocio ĉe:

www.esperantojuro.org




LA BIBLIOTEKO DE SEVILA ESPERANTO-ASOCIO APOGITA DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Universala Esperanto-Asocio, pere de la subvencio "Biblioteka Apogo Maria kaj Johano Bachrich", kies celo estas pliriĉigi kolektojn de Esperanto-bibliotekojn, ĵus helpis la libron de Sevila Esperanto-Asocio pere de la donaco de dudeko da libroj. Temas pri la dua kunlaboro plenumita dum la lastaj jaroj al la sevila asocio fare de la tutmonda UEA.



LASTMINUTA TRISTA NOVAĴO: FORPISIS JUAN ANTONIO TORRES GALÁN



Je sia 72-a vivo-jaro, la pasintan 26-an de oktobro 2024, forpasis nia kara samideano Juan Antonio Torres Galán *Juantor*. Malgraŭ sia handicapiteco, kiu kaŭzis al li problemojn por marŝi kaj paroli, li ofte ĉeestis esperantistajn renkontiĝojn kaj subtenis ĉiam afablan konversadon en la internacia lingvo.

La vivo de Juan Antonio estas diskoniginda, kaj sendube ni parolos pri li baldaŭ en nia rubriko pri elstaraj esperantistoj tra la historio de la movado en Andaluzio.

Pace ripozu, kara Juantor !

AVERTO PRI LA BANKO-KONTO DE NIA ASOCIO

De antaŭ kelke da tempo ni havas problemojn rilate la banko-konton de
nia asocio ĉe

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Do, verŝajne, ni devos fermi ĝin kaj plejble malfermi novan konton ĉe
alia banko. Pro tio, ni petas al la membroj de la asocio ne pagi pere de tiu
banko-konto la jaran kotizon (20 €) de la jaro 2025, same, se oni ankoraŭ
ne pagis tiun de la jaro 2024. Sur la venonta numero ni informos pri la
nova banko-konto de la asocio.

Dankon.



AVISO SOBRE LA CUENTA BANCARIA DE NUESTRA ASOCIACIÓN

Desde hace algún tiempo estamos sufriendo continuos problemas en la
cuenta bancaria de

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Así que es muy probable que tengamos que cambiar en breve la cuenta
e incluso la entidad bancaria, por lo que rogamos a nuestros socios que
no ingresen en dicha cuenta la cuota de 20 € correspondiente a 2025 o,
igualmente la de 2024, si todavía no lo han hecho.

En el próximo número informaremos de la nueva cuenta de la Asociación.

Gracias.

Andaluzio videbla el la spaco

Tradicia rakonto asertas, ke el la spaco estas videblaj la egiptaj piramidoj kaj la longa ĉina murego. Tamen, ĉi tio ne estas tute certa, ĉar la solaj homaj konstruaĵoj videblaj el la sputnikoj (artefaritaj satelitoj) ne troviĝas ĉe la foraj Egiptio aŭ Ĉinio, male, ili troviĝas ĉi tie, tuj apude, sur la andaluzia provinco Almerio. Temas pri la "mantelo el plastiko", kiu kovras la granda etendaĵo de la forcejoj.



La egiptaj piramidoj kaj la longa ĉina murego ne estas videblaj el la spaco

Forcejoj estas konstruaĵoj el plastiko, uzitaj por kultivi plantojn, donante al ili la plej bonajn kondiĉojn, por ke ili plej rapide kresku. En Almerio, forcejoj etendiĝas tra, proksimume, 300.000 hektaroj, kies celo, ĉefe, estas la kultivado de fruktoj kaj legomoj, inter ili tomatoj kaj kukumoj, kiuj, siavice, estas amase eksportataj en aliajn eŭropajn landojn. La plej grandaj etendaĵoj de ĉi tiuj forcejoj troviĝas ĉe la urbo El Ejido, ili estas konataj kiel "la maro el plastiko".

Ĉi tiuj forcejoj reflektas la sunan lumon, do, ili estas facile videblaj el la spaco, almenaŭ de la regiono kie satelitoj orbitas. Tiel, diversaj kosmo-ŝipoj de la usona spac-agentejo NASA aŭ de la eŭropa ESA disvastigis fotografadojn sur kiuj impona blanka loko aperas sud-oriente de la ibera duon-insulo.



Forcejoj en Almerio videblaj el spaco

Kompreneble, la potencaj kameraoj de ĉi tiuj ŝipoj faciligas la vidadon, tamen, laŭ asertoj de astronautoj, pere de simplaj binokloj je 400 kmoj de la tera surfaco, estas eble distingi ĉi tiujn homajn konstruaĵojn, ne tiel antikvaj aŭ imponaj kiel piramidoj aŭ la granda ĉina murego, sed pli facile videblaj el la spaco.





Existe una preposición en esperanto que, a veces, a los hispano-parlantes nos cuesta un poco diferenciar de otras parecidas y, por eso, no solemos utilizarla. Se trata de la preposición *ĈE*. En algunos diccionarios de esperanto *ĉe* aparece con el significado "en casa de", sin duda se trata de una traducción directa de la preposición francesa de la que proviene, "chez", la cual efectivamente en ese idioma significa "en casa de". Pero en esperanto no tiene exclusivamente ese significado.



ĈE indica una posición aproximada y su significado exacto, a veces, hay que entenderlo gracias al contexto en el que se usa y al que se refiere, ya que no muestra la localización exacta y precisa de un lugar o de un tiempo, sino que es solo aproximada.

No debemos confundir *ĉe* con *apud* (junto a), en tanto que ésta última se refiere a una localización que se encuentra a la derecha o a la izquierda, delante o detrás de algo, es decir hay una contigüidad entre los objetos unidos por *apud*.

Veamos algunos ejemplos:

- *La trinkejo troviĝas apud la stacidomo.*
El bar se encuentra junto a la estación.

Esta frase indica que el bar se encuentra a un lado o a otro de la estación. Sin embargo:

- *La trinkejo troviĝas ĉe la stacidomo.*

Esta frase indicaría que el bar se encuentra en la proximidad de la estación, puede ser que exista una relación de contigüidad, pero no necesariamente es así, o no queremos indicar si se encuentra a la derecha o a la izquierda, delante o detrás de la estación.

- *Mi renkontos kun mia amiko ĉe la angulo de la strato.*
Me encontraré con mi amigo en la esquina de la calle.
- *Metu la libron ĉe la finon de la ŝranko!*
¡Coloca el libro al final de la estantería!

Podría haber dicho "*sur la finon de la ŝranko*", en este caso significaría que el libro tiene que ser colocado al final, en la última posición. Sin embargo, "*ĉe la finon*" indicaría que el libro debe ser colocado en lugar próximo al final, o incluso al final mismo, pero no necesariamente en ese lugar. En este ejemplo *ĉe* indica no un lugar concreto, sino el ambiente o las proximidades de ese lugar.



Li estas en la fino de la vico.
Él está en el final de la fila.



Li estas ĉe la fino de la vico.
Él está sobre el final de la fila.

Se indicó anteriormente que *ĉe* aparece en los diccionarios esperanto-español con el significado "en casa de", por supuesto también expresa esa idea:

- *Mi iros ĉe miaj gepatroj dum Kristnasko.*
Iré a casa de mis padres durante la Navidad.

También se podría haber dicho: "*Mi iros en la hejmon de miaj gepatroj...*"

Se utiliza también en refranes y dichos que también existen en español con la idea de "en casa de":

- *Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo.*
En casa del zapatero el zapato siempre está con un agujero.
O menos literalmente:
En casa del herrero cuchillo de palo.

También puede incluso referirse a un lugar más amplio que simplemente un hogar o una casa:

- *En la nordaj landoj la suno malpli varmas ol ĉe ni.*
En los países nórdicos el sol calienta menos que en los nuestros.

En este ejemplo "*ĉe ni*" no se refiere a nuestras casas, sino a nuestros países.

La preposición *ĈE* se refiere no a un lugar fijo, sino a un ambiente, a un entorno, a una atmósfera...

Ĉe bonaj amikoj paco regas.
En un ambiente de buenos amigos la paz impera.

Veamos algunos ejemplos más:

- *Kopirajto ĉe la aŭtoro.*
El derecho de copia en el entorno del autor.
O en una traducción menos literal: "El derecho de copia pertenece al autor".
- *Li estas tre maldika, li estas ĉe la koksoj.*
Está muy delgado, se está quedando en los huesos.
(literalmente: "está muy delgado, está en las caderas".)

- *Kaptu la okazon ĉe la kapo.*

Coge la ocasión por la cabeza.

Corresponde al dicho "Coge la ocasión por los pelos".

Usando "*ĉe la kapo*" no se está indicando un lugar concreto, sino el entorno de la cabeza. En este caso al referirse a "ocasión", la cual evidentemente no tiene una cabeza, nos referimos al primer momento visible de esa oportunidad.

Ĉe también puede referirse a un momento en el tiempo. En este caso la idea que expresa tampoco se referiría a un instante concreto, sino a un momento en el que también sucede otra cosa. En estos casos sería fácilmente sustituible por "*kiam*". Veamos algunos ejemplos:

- *Ĉe la komenco de la tagiĝo kokoj krias.*

Al comienzo del amanecer los gallos cantan.

Podríamos haber dicho también:

- *Kiam tagiĝo komenciĝas, kokoj krias.*

Cuando comienza el amanecer los gallos cantan.

O también "je la komenco de la tagiĝo..."

Usando *ĉe* no nos referimos a que algo ocurra a una hora exacta (ej. a las 05:00 horas), sino a que algo sucede alrededor de una hora o de un momento.

Usando la preposicion *ĉe* con una idea de tiempo, expresamos que algo ocurre no en un instante exacto, sino con ocasión de algo.

Recordemos, que si queremos indicar un momento concreto usaremos *JE*:

- *Mi revenos hejmen je la 11-a horo.*

Regresaré a casa a las 11 horas.

Y si se trata de un momento aproximado utilizaremos *ĉirkaŭ* o *proksimume*:

- *Mi revenos ĉirkaŭ la 11-a horo.*

Regresaré alrededor de las 11 horas.

Pero utilizaremos *ĉe* para indicar que algo ocurre cuando otra cuestión también sucede:

- *Sonoriloj tintas ĉe forta vento.*

Suenan campanas con ocasión de un viento fuerte.

En este caso también podríamos haber dicho:

- *Sonoriloj tintas okaze de forta vento.*
- *Sonoriloj tintas kiam okazas forta vento.*

Otro uso de la preposición *ĉe* lo encontramos unido al acusativo de dirección. Veamos algunos ejemplos:

- *Movu la tablon ĉe la muron.*

Mueve la mesa a la pared.

No se trata de una construcción gramatical muy habitual, aunque puede utilizarse, expresa la idea de realizar un movimiento que tiene como punto final no un lugar concreto, sino su entorno. Así, diciendo "*ĉe la muron*", no nos estamos refiriendo a que la mesa debe quedar colocada tocando la pared, sino en su entorno. Si hubiéramos querido indicar que la mesa debe ser movida hasta quedar en contacto o contigua a la pared, habríamos dicho "*ĝis la muro*".



- *Li transloĝiĝos ĉe siajn gepatrojn.*
Él se mudará a casa de sus padres.

También podríamos haber usado "en la hejmon de siaj gepatroj".

La preposición *ĈE* también la podemos encontrar unida a otras palabras, veamos algunos ejemplos:

- *Mi ĉeestos la kongreson.*

Asistiré al congreso.

Se trata del verbo *ĉeesti* (asistir), en este caso el verbo *esti* se completa con la idea de "estar en el ambiente".

- *Li ĉiam havas cigaredon ĉemane.*

Él siempre tiene un cigarrillo en la mano.

Es decir, tiene algo entre sus manos listo para usarse.



A screenshot of the website 'Andaluzia Esperanto-Unuiĝo' (Andalusian Esperanto Association). The page features a green header with the organization's name in Esperanto and Spanish, along with logos for 'aou', 'UNUIĜO', 'Asociación Andaluza de Esperanto', 'Instituto Andaluz de Estudios Lingüísticos', and 'Fundación Esperanto-Hispana'. Below the header is a navigation menu with buttons for 'Inicio', '¿Qué es el esperanto?', 'Como aprender esperanto', 'Aprende con juegos', 'Andaluzia', and 'Gazeto Andaluzia'. A secondary menu includes 'Grupos locales en Andalucía', 'Pri Flamenka', and 'VENTO'. The main content area has a light green background with the text 'En el mundo se hablan más de 6000 lenguas.' and a colorful graphic of the word 'Thank you' written in various languages and scripts, including English, Spanish, Japanese, and others. At the bottom of the page, there are five small white dots on a green background, indicating a carousel or a list of items.

TTT-paĝo de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
www.esperanto.ac

La cigana monaĥino

Al José Moreno Villa

Silento mirta kaj kalka.
 Malvoj inter herbaj tigoj.
 Nun la monaĥino rozon
 brodas sur pajleska lino.
 En la griza lustro flugas
 la sep birdoj de la prismo.
 La preĝejo fore grumblas
 kiel urso sur la spino.
 Kiel bele ŝi brodadas!
 Kaj sur la pajleska lino
 florojn ŝi sopiras brodi
 el la propra fantazio.
 Kiaj sunoflor' kaj strasa,
 bantoriĉa magnolio!
 Kiaj steloj kaj safranoj
 por mes-tukoj de la kirko!
 Kvin citronoj sin dolĉigas
 en la kuireja niĉo.
 La kvin vundoj de Jesuo
 el kampar' de Almerio.

En la monaĥin-okuloj
 tragalopas du rajdistoj,
 kies surda, lasta zumo
 de ŝi levas la ĉemizon.
 super ebenaj' en klino!
 Sed ŝi sian floron brodas,
 dum piede en la brizo
 Nubojn, montojn ŝi rigardas
 en la krutan malproksimon,
 kaj rompiĝas ŝia koro
 el suker' kaj glicirizo.
 Kiajn riveregojn starajn
 vidas ŝia fantazio!
 Kian lumon dudek-sunan
 super ebenaj' en klino!
 Sed ŝi sian floron brodas,
 dum piede en la brizo
 la taglumo ŝakon ludas
 alte tra la ĵaluzio.



Federico García Lorca (1928)
(Tradukis Fernando de Diego)



NUNTEMPA VORTARO

Kiel agadi okaze de pneŭa trapikiĝo



Haltigu la aŭtomobilon



Uzu la 4 intermitajn lumojn



**Trapikiĝita pneŭo
aŭ pneŭmatiko**



Antaŭ ol eliri el la aŭtomobilo, metu vian **altvideblecan vestaĵon**.



Loku **triangulan avertilon** je 100 metroj post la aŭto.
(Post julio 2023 en Hispanio ne estas devige loku ilin)



Aŭ metu **lamp-avertilon** sur la aŭto.
(Depost la komenco de la jaro 2026 estos devige en Hispanio uzi ilin)



Se necese metu **kojnon** sub alia rado por tute senmovebligi la aŭton.



Se la rado de la aŭtomobilo havas **nabo-ĉapon**, demetu ĝin.



Prenu la **vic-radon**



Malŝraŭbu la **boltojn**, sed atentu, ne eltiru ilin el la rado.



Por malŝraŭbi la **boltojn** agu inverse al horloĝ-movo.

Por malŝraŭbi la boltojn uzu unu el la jenaj iloj:

Okula boltilo



Pipa boltilo



Kruc-boltilo



Se necese, uzu la forton de piedo por pli facile malŝraŭbi la boltojn.



Sciu, ke unu el la boltoj povas esti speciala, temas pri **sekuriga bolto.**

Ĉi-kaze, la aŭtomobilo mem disponos pri popra speciala boltilo por demeti ĝin.



Ofte, estos necese uzi **prirajpan oleumilon** por malŝraŭbi la boltojn.



Kun la boltoj de la rado malŝraŭbitaj, sed ne demetitaj, metu la **krikon** sub la aŭtomobilo apud la difektita rado, tiel vi povos levi la aŭton.



Ekzistas ankaŭ **hidraŭlikaj krikoj**



Kun la aŭtomobilo levigita, la difektita rado jam ne tuŝas la plankon, tiam demetu la malŝraŭbitajn boltojn. Demetu poste la difektita rado.



Instalu la **vic-radon** ĝustaloke.
La truoj de la nova rado devas esti
alĝustigitaj al la lokoj de la boltoj.

Metu la boltojn en la ĝustajn
truojn, ŝraŭbu ilin iomete,
ankoraŭ ne tre forte.

Poste mallevu la aŭton pere de la
kriko.



Kun la aŭtomobilo jam sur-planke,
ŝraŭbu tre forte la **boltojn**.



Memoru, ke por ŝraŭbi
la boltojn, vi devas agi
laŭ la horloĝ-movo.



Denove instalu la
nabo-ĉapon.



Ne forgesu demeti
la triangulan
avertilon aŭ/kaj
la lamp-
avertilon.





Ofte, aŭtomobiloj portas nur **urĝan vic-radon**, tio estas, uzebla nur por kelkaj kilometroj. Se tiel, vizitu mekanikan atelieron kiel eble plej rapide, por ŝanĝi ĝin per alia definitiva rado.

Pliaj vortoj rilate radojn:



Valvo

Peco, destinita enlasi aeron en la pneŭon.



Lastatempe, estas eble ripari kelkajn radojn ne per ties ŝanĝado, sed ja per la uzo de **sprajilo kontraŭ trapikiĝo**. Se tiel, por ripari la difektitan radon estos necese nur verŝi la gasan enhavon de la sprajilo ene de la radon.



Manometro

Aparato, servanta por mezuri la premon de gaso ene de la rado.



Aer-pumpilo

Aparato por altiri aŭ repuŝi aeron en la radon.

Elektra aer-pumpilo





Folioj por praktikado

El texto que vamos a utilizar es una micronovela del autor Maurizio Giacometto 'Rico', escrita originalmente en esperanto. El texto apareció en la revista "Usona Esperantisto" en junio de 2020 y contiene exactamente 100 palabras.

Planedo

Kiam **alimondanoj** trovis planedon en **ĵus** malkovrita **planedsistemo**, ili **kromnomis** ĝin La ruĝa planedo. En **sia** raporto al la interstela komandejo, ili skribis: “La planedo **ŝajnas kiel** bruligita ŝtono, **kvazaŭ vivo estintus iam tie**, sed ne **plu**. **Laŭkalkule**, la planedo estas la kvara de tiu sistemo.”

Oni trovis ankaŭ iun malnovan **skribaĵon**: estis la sola **tiaspeca trovitaĵo** kaj enhavis **frazerojn**, ĉefe nekompreneblajn **krom** verso, kiu tekstis: **malam’ kontraŭ unu la aliaj** mortigos vin.

Leginte la raporton, respondeculoj en la komandejo atingis la finan paĝon kaj rimarkis **piednoteton**: “**Korektendaĵo**: estis **mezuraderaro**. La ruinigita planedo ne estas la kvara, **sed** la tria ...”

> alimondanoj

Recuerda que *alia* significa otro y como finaliza en "a" es un adjetivo. *Alia mondo* significaría "otro mundo", pero podemos unir ambas palabras suprimiendo el final de la primera palabra. Por otra parte, el sufijo *ano* significa: habitante, miembro de un grupo. Así que la traducción de *alimondanoj* sería "habitantes de otro mundo".

> ĵus

Se trata de un adverbio que tiene el significado de algo ocurrido recientemente. Su significado es ese precisamente: recién, recientemente, justo ahora ... Un ejemplo de este adverbio sería la frase:

- Mi ĵus finis la laboron.

Yo acabo de terminar el trabajo / Recientemente acabé el trabajo

En el ejemplo del texto se habla de *ĵus malkovrita*, su significado sería "recién descubierto".

> planedsistemo

A la hora de escribir en esperanto cada autor tiene su propio estilo. Parece que al autor de este texto, Maurizio Giacometto, es partidario de la unión de algunas palabras. Cuando se unen dos palabras en esperanto la que se coloca al final es la importante, ejemplo: podemos decir *libro por lerni* o simplemente *lerno-libro* (se podría decir también *lernlibro*, pero en este caso se acumularían 3 consonantes r+n+l, lo que quizá dificultaría la pronunciación, por lo que podemos simplemente unir las por un guión), Pues bien, un *lerno-libro* es ante todo un libro (*libro*), no un aprendizaje (*lerno*), por eso la palabra principal se coloca al final.

Lo mismo ocurre en el ejemplo del texto. *Planedsistemo* podría haberse escrito también como *sistemo de planedoj* (sistema de planetas), pero el autor ha preferido unir ambas palabras, eliminando la terminación de sustantivo de la primera "o", porque en este caso no hay una acumulación de consonantes que haría difícilmente pronunciable la palabra.

Planedsistemo no es un planeta, sino un sistema, por lo que la palabra principal se coloca al final. Veamos más ejemplos de palabras que podemos unir:

- *Instrumetodo*: método de enseñanza (es un método, no una enseñanza, así *metodo* va al final).

- *Dormoĉambro*: dormitorio. También podría haberse escrito como *dormĉambro* o *dormo-ĉambro*. Sin embargo *dormĉambro* de nuevo sería más difícil de pronunciar.

> kromnomis

Nos encontramos con la construcción: preposición *Krom* (además) + verbo *Nomi* (llamar). *Krom* puede unirse a algunos verbos y sustantivos, aportando la

idea de que algo sucede, o algo hay, además de lo que indica el verbo o el sustantivo al que acompaña. Veamos algunos ejemplos:

- *Kromedzino*
Sería cada una de las esposas en un sistema poligámico.
- *Kromdomoj*
Son las casas auxiliares que pueden encontrarse en torno a una gran residencia principal.
- *Kromfolio*
Es la hoja auxiliar que se añade a un libro, donde se contienen algunas notas.
- *Kromnomo*
Es el nombre que se da a una persona, además del que ya tiene legalmente, sería el mote, seudónimo...

En el texto se utiliza el verbo en pasado *kromnomis* y se podría traducir como "llamar también con el nombre de...", en este caso le dieron al planeta recién descubierto el *kromnomo* de *La ruĝa planedo*.

> **sia raporto**

Recordemos que *sia* es el posesivo del pronombre de tercera persona *SI*. Se refiere siempre al sujeto de la frase y se utiliza para evitar confusiones que encontramos en otros idiomas. En el ejemplo del texto *sia raporto* (su informe) va referido al sujeto *ili* (*informis*). La frase en una construcción más clara sería *ili skribis en sia raporto*, es decir los autores del informe son el sujeto de la oración: *ili*.

> **ŝajnas kiel**

El verbo *ŝajni* se traduce por "parecer, tener el aspecto de...". La traducción de la frase del texto *La planedo ŝajnas kiel bruligita ŝtono*, sería "el planeta parece como una piedra quemada".

Un uso práctico del verbo *ŝajni* es la construcción *ŝajnas al mi ke...*

- *Ŝajnas al mi ke, morgaŭ pluvos.*
Me parece que mañana lloverá.
- *Li ne ŝatis la libron, ŝajnis al li, ke ĝi ne estas leginda.*
No le gustó el libro, le pareció que no era digno de ser leído.

> kvazaŭ vivo estintus iam tie

Kvazaŭ lo podemos traducir por "como si", su función es introducir una frase que expresa algo que nos parece posible, aunque no sabemos si es real o no. Al tratarse de una frase en la que estamos hablando de algo posible, lo lógico es usar el tiempo verbal condicional, aunque no tiene por qué ser así siempre, en tanto que puede ocurrir que la frase exprese algo que es muy posible que sea cierto, pero no necesariamente lo es. Veamos algunos ejemplos:

- *Li elspezas monon, kvazaŭ li estus milionulo.*
Él gasta dinero, como si fuera millonario.
- *Mi fartas tre malbone, kvazaŭ mi malsanas je gripo.*
Me siento muy mal, como si estuviera enfermo de gripe.

En cuanto a la forma verbal *estintus*, se trata del participio de pasado en modo condicional y su traducción sería "hubiera habido". No es muy habitual utilizar estos tiempos verbales en el esperanto que usamos a diario, pero hay que reconocer que existen. *Estintus* se forma de la siguiente manera:

- Verbo *ESTI*: ser, estar, haber.
- Participio del verbo *esti*: *estinto* (que fue, que hubo)
estanto (que es, que hay)
estonto (que será, que habrá)
- En forma condicional del participio pasado: *estus estinta* o *estintus*.

La traducción de la frase *kvazaŭ vivo estintus iam tie* sería "como si hubiera habido vida alguna vez allí".

> plu

Recordemos las tres formas de decir "más" en esperanto, según el significado concreto de cada una de ellas:

Pli: más, referido a cosas, situaciones, hechos...

Mi studis geometrion, kalkulon kaj trigonometrion, mi ne povas studi pli.

Yo estudié geometría, cálculo y trigonometría, no puedo estudiar más (se refiere esta frase a estudiar más cosas).

Plu: más, referido a tiempo.

Mi ne povas studi plu. Yo no puedo estudiar más (tiempo).

Plus: más, como operación matemática de suma.

Du plus tri estas kvin. Dos más tres son cinco.

> Laŭkalkule

El esperanto es una lengua que ofrece una gran libertad a sus hablantes, así podemos transformar las palabras, siendo muy importante que la terminación de la forma creada nos indique de qué tipo de palabra se trata. En este caso el autor del texto ha transformado la construcción "preposición + sustantivo", en un adverbio, lo vemos porque la palabra que ha utilizado termina en "e", la terminación de los adverbios.

La forma original y quizá más usual, habría sido *laŭ kalkuloj* (según cálculos), pero el autor ha preferido convertirlo en el adverbio *laŭkalkule*, con el mismo significado.

> skribaĵon

Recordemos el sufijo "-aĵ", que da la idea de cosa. Así, de *skribi* (escribir) obtenemos *skribaĵo* (cosa escrita). Referido a este mismo sufijo tenemos que mencionar también, que cuando se emplea con la raíz de un animal, se está refiriendo a "carne de ese animal", ejemplo: *bovo* (buey), *bovaĵo* (carne de vacuno); *porko* (cerdo) *porkaĵo* (carne de cerdo); *ŝafo* (cordero) *ŝafaĵo* (carne de cordero).

> tiaspeca trovitaĵo

Tenemos que recordar que *tia* significa "de esa clase", unido al adjetivo "speca" se redonda en la misma idea, ya que su significado sería "de esa especie, de esa categoría".

Por otra parte, recordamos el sufijo "-aĵ" que hemos visto anteriormente. *Trovitaĵo* significa "cosa encontrada, cosa descubierta". De este modo *tiaspeca trovitaĵo* podría traducirse como "un descubrimiento de esa clase".

> frazero

El sufijo "-er" se refiere a la parte de un todo. Veamos algunos ejemplos:

- *Sablo / sablero*: Arena / grano de arena.
- *Neĝo / neĝero*: Nieve / copo de nieve.
- *Oro / orero*: Oro / pepita de oro.

En el texto encontramos *frazeroj*, no es necesario atribuirle una traducción exacta al español por medio de otra palabra, basta con tener la idea de a lo que se refiere. Podríamos decir que *frazeroj* son "trozos de frases".

> Krom

Hemos visto anteriormente que la preposición *krom*, unida a un verbo o a un sustantivo, le asigna algo más, siempre referido a la palabra a la que va unida. Así, *kromnomo* sería "otro nombre más aparte del que tiene, un mote, un seudónimo, un alias". Pero *krom* también tiene otra acepción, ésta es el significado de indicar una excepción de algo.

Veamos algunos ejemplos de esta acepción de *krom*:

- *Mi amas ĉiujn miajn amikinojn, krom ŝi.*
Amo a todas mis amigas, excepto a ella.
- *Post prezenti siajn ideojn li ricevis nenian opinion, krom insultojn kaj mokojn.*
Después de presentar sus ideas él no recibió opinión alguna, que no fueran insultos o chanzas.

Si el uso de *krom* como excepción a algo no fuera muy claro, se recomienda utilizar "*escepte de*", que tiene el mismo sentido.

En la frase del texto se indica *ĉefe nekompreneblajn krom verso* con el significado de "principalmente incomprensibles excepto un verso".

> malam' kontraŭ unu la aliaj

Recordemos que una de las 16 reglas fundamentales del esperanto permite la elisión de la vocal en el artículo *la*, quedando como *l'*, así como el final de los sustantivos que pueden quedar como *libro / libr'*; *revuo / revu'* y así para todos los sustantivos. En estos casos no cambia el acento de la palabra. También hay que indicar que esta elisión no suele darse en textos en prosa, sino en poesía.

En el texto *malam'* se refiere a *malamo* (odio). La traducción de *malam' kontraŭ unu la aliaj* sería "odio de unos contra los otros".

> Leginte

El participio de pasado del verbo "legi" convertido en adverbio (final -e) se puede traducir como "habiendo leído". Veamos algunos ejemplos más del uso de esta forma verbal:

- *Laborinte, mi jam povas ripozi.* Habiendo trabajado ya puedo descansar.
- *Dorminte sufiĉe, mi povas eklabori.*
Habiendo dormido lo suficiente puedo empezar a trabajar.

> Piednoteton

Vamos a volver a recordar la regla de oro cuando se unen dos palabras: la principal se coloca al final. Pero ¿cómo saber cuál es la principal? Para averiguarlo tenemos que hacernos una pregunta. La palabra que resulta de la unión de dos ¿con cuál de ellas guarda más relación?

Veamos el ejemplo del texto. La palabra resultante es *piednoteto*, se traduce "pequeña nota al pie". Nos preguntamos entonces ¿la palabra resultante de la unión entre "pie" y "nota" tiene más que ver con un pie o con una nota? Está claro que es una nota, bien, pues esa es la palabra principal, por eso la colocamos al final.

Nota al pie sería realmente *piednoto*, pero si queremos utilizar el diminutivo, es decir, una pequeña nota al pie, sería *piednoteto*. Recordemos que el sufijo para el diminutivo en esperanto se forma con "-et".

> Korektendaĵo

La raíz de esta palabra sería el verbo *korekti* (corregir). El sufijo "-end" da a entender "que debe", que tenemos la obligación de hacer lo que indique la raíz. Mientras que, como ya hemos visto, el sufijo "-aĵ" nos indica algo concreto, una cosa. Así que la traducción podría ser "cuestión a corregir", "cosa que debe ser corregida".

> Mezuraderaro

Desde luego al autor le gustan las palabras compuestas. En este caso estaría formada por las siguientes: *mezurado* (medición) y *eraro* (error). Para saber cuál es la palabra que debemos colocar al final nos hacemos la pregunta de antes: ¿*Mezuraderaro* (error de medición) es una medición o es un error? Está claro, es un error, así que la colocamos al final.

> sed

Ya sabemos que la traducción de *sed* es "pero". En las oraciones en las que aparece una negación la traducción más acertada sería "sino". Veamos algunos ejemplos:

- *Mi ne volas legi ĉi tiun libron, sed tiun alian.*
No quiero leer este libro, sino aquél otro.
- *Ne pruntedonu al li vian aŭtomobilon sed vian motorciklon.*
No le prestes tu coche sino tu moto.

Turismi en ...

CABRA (Kordovo)

Tuj apud la Sub-betika montaro, sude de la kordova provinco, ĉirkaŭigita de olivarboj kaj hortoj, apud rivero kie abundas verdaj kverkoj kaj blankaj poploj, troviĝas la urbo Cabra, esperantigita Kabro.

Tradicie, oni asertas, ke la fondintoj de la unua tiea setlejo estis la turdetanoj, konsideritaj kiel posteuloj de la tarŝiŝa civilizacio. Ili nomis la lokon kiel "Licabrum", kiu poste dank'al romianoj fariĝis "Igabrum". Tito Livio parolas en la 1-a jarcento p.K pri la urbo "Egabrum", laŭ ĉi tiu

romia historiisto, Egabrum estas unu el la plej gravaj urboj en la hispania provinco. Kaj tio sendube estis tiel, do, post la kristanigo de la romia imperio Egabrum fariĝis episkopa sidejo.

Kiam la Ibera Duoninsulo estis konkerata de la islamanoj, la urbo ricevis en la jaro 717 novajn enloĝantojn de la iraka urbo Wasit, tiam la romia Egabrum ŝanĝis sian nomon al Qabra.

Dum la militoj inter kristanoj kaj islamanoj, Kabro estis strategia loko, pro tio la reĝo de Granado Mohamedo la 1-a ordonis plifortigi la kastelon kaj muregojn. Fine, en la jaro 1244, la urbo estas konkerita de la reĝo Alfonso la 9-a de Leono, kiu donacis ĝin al sia filo Alfonso. En la jaro 1455 la urbo estas donacita al Diego Fernández de Córdoba, marŝalo de Kastilio, kiu tiam fariĝis Grafo de Kabro.

Fine de la 17-a jarcento Kabro fariĝis unu el la plej gravaj kulturaj lokoj en Andaluzio. Tio okazis dank'al la senavara donaco de la pastro Luis de Aguilar y Eslava, kiu laŭtestamente lasis siajn havaĵojn kun la celo starigi mezgradan lernejon en la urbo. Tiu



Blazono de Cabra

gimnazio ankoraŭ ekzistas, ĝi havas la nomon de sia fondinto: Aguilar y Eslava kaj dum jarcentoj multaj homoj tie studis, inter ili kelkaj gravuloj, kiel Blas Infante aŭ la unua prezidanto de la dua hispana respubliko Niceto Alcalá Zamora.

Dum la 19-a jarcento la urbo disvolviĝis el la ekonomia vidpunkto, Kabro pligrandiĝis kaj fervoja linio ebligis facilan komunikadon kun aliaj andaluziaj vilaĝoj, pere de la tiel nomata "oliv-olea fervojo", ni ne forgesu, ke Kabro troviĝas ĉe la centro de Andaluzio. Tamen, la komenco de la 20-a jarcento estis terura por la urbo. Tiel, dum la hispana milito, en la jaro 1938 la urbo suferis masakron, kiam aviadiloj de la respublika armeo bombardis Kabron dum merkata tago. Mortis pli ol 100 homoj.

Meze de la 20-a jarcento la ekonomio pliboniĝis, kvankam kiel okazis ĉe ĉiuj andaluziaj vilaĝoj,



Kastelo

multaj homoj devis elmigri en la nordon de Hispanio, ĉefe al Katalunio, por labori en la tiea industrio. Hodiaŭ Kabro estas urbo kun pli ol 20.000 enloĝantoj, kies ĉefaj ekonomiaj rimedoj estas la olivarboj, la vitejoj kaj lastatempe la natura turismo, dank' al la Parko de la Sub-betikaj Sieroj.

Natura fonto en Kabro



Monumentoj

• Kastelo de la Grafoj de Kabro

Ĝi troviĝas apud la ĉefa kristana preĝejo, antikva islama moskeo, ĉe la plej alta pinto de la urbo. Starigita dum la 9-a jarcento sur ĝi okazis batalo en la jaro 1079 inter la islamaj regnolandoj de Granado kaj Sevilo. Rekonstruita dum la 14-a jarcento.

• Preĝejo de *Asunción y los Angeles*

La antikva moskeo fariĝis kristana templo post konkero de la urbo en la jaro 1240. Ĝi estis dediĉita honore al la Ĉieliro de la Virgulino Maria kaj al Anĝeloj, jen la nomo de la preĝejo. Ĝi estas konata kiel la *baroka moskeo*.

La templo havas kvin navojn kaj ene de ĝi stariĝas 44 kolonoj, konstruitaj de ruĝa jaspo, eltirita de la Kabra montaro. Elstariĝas ankaŭ altaro kun ornamaĵoj el jaspoj nigra kaj ruĝa.

• Arkeologia Muzeo

Fondita en la jaro 1973, la arkeologia muzeo de Kabro montras grandan kolekton de arkeologiaj eltrovoj, tio pruvas la riĉan historion de la urbo. Inter la plej famaj pecoj aperas skulptaĵo de Mitrao, eltrovita en la jaro 1951.

• Fonto de l'rivero

Temas pri natura fonto al kiu oni aldonis belegan ĝardenon kaj abundan arbaron. Ĝi estas belega natura loko, kie eblas promeni ĉirkaŭigita de la sono de fonta akvo.

• Preĝejo de la Virgulino de la Siero.

Je 15 kilometroj de Kabro, supre de monto, troviĝas la preĝejo de la Virgulino de la Siero, religia patronino de la urbo. La konstruaĵo stariĝis en la jaro 1260.



Festoj

Komence de la monato septembro, koincide kun popola foiro, fidelululoj descendigas la figuron de la Virgulino de la Siero el ĝia preĝejo en la montaro ĝis la urbo.



Dumpaske, al la tradiciaj religiaj paradoj por memori la Pasionon de Kristo en Jerusalemo, oni devas aldoni specialajn ingrediencojn de la Kabra Sankta Semajno, inter ili la sono de la *abelegoj*, temas pri longaj trumpetoj,

kiuj anoncas la alvenon de la religiaj figuroj de Jesuo kaj Maria dum la parado. Ankaŭ eblas aŭskulti la *rompevelos* dum la aŭroro de la Paska Vendredo.

Gastronomio

En Kabro siero kaj hortoj unuiĝas por difini la gastronomian riĉecon de la urbo. Tiel, estas eble trovi samtempe freŝajn legomojn kaj bongustan viandon. Oliv-oleo tie produktata estas la bazo de ĉiuj manĝaĵoj kaj vino la plej taŭga akompananto.

Tipaj en Kabro estas gazpaĉo, legomaj kuiradoj, spinacoj kun kikeroj kaj la rizo *empedrao*. Kiel desertoj estas eble trovi *pestiños* kaj *gajorros* dumpaske. Delicaj estas ankaŭ la oliv-oleaj tortoj kaj la *bizcotelas* de la monaĥinoj.

Venontnumere Turismi en ...
IZNATORAF (Jaeno)





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Pola sciencisto en la Sevila foiro - 1933

Agadi profesie kiel bakteriologo kaj higienisto, aŭ esti unu el la unuaj sciencistoj okupiĝantaj pri vakcinoj, krom labori kiel universitata profesoro en nordeŭropa lando, ne nepre signifas rifuzi ĝui la plezurojn de la vivo aŭ esti ensorĉita de andaluzia festo.

Ni parolas pri profesoro Odo Bujwid kaj pri ties vizito al Andaluzio en la jaro 1933. Odo Feliks Kazimierz Bujwid naskiĝis en la jaro 1857 en Vilno. Li studis medicinon en la Universitato de Varsovio kaj bakteriologion en Berlino en 1885 ĉe la eminenta Robert Koch, eltrovanto de la tuberkuloza bacilo. Poste, en 1886, li estis la unua polo kiu studis apud Louis Pasteur en Parizo la vakcinadon kontraŭ rabio. En la jaro 1887 li publikigis propran biokemian metodon de rekonado de vibrioj de ĥolero en kultivaĵoj, tiam li atingis grandan agnoskon en la scienca mondo.

En tiu sama jaro, 1887, juna pola doktoro sub la pseŭdonimo *Doktoro Esperanto*, diskonigis eseon pri nova internacia lingvo. Laŭdire, inter la jaroj 1881 kaj 1882, la medicinaj



Odo Bujwid 1857 ~ 1942

studentoj en la Varsovio Bujwid kaj Zamenhof (*Doktoro Esperanto*) interkonatiĝis kaj eble Zamenhof sciigis al Bujwid sian intereson rilate internacian lingvon.

Tutcerte Odo Bujwid lernis la lingvon de Zamenhof, tiel, li poste agadis ene de la esperanto-movado en Pollando. En la jaro 1912 li fariĝis prezidanto de la 8-a Universala Kongreso en Krakovo, kaj post la unua mondmilito li estis prezidanto de la Tutpola Federacio de Esperanto-Societoj. Krome, dum pluraj jaroj

li eldonis proprakoste la periodaĵon "Pola Esperantisto" kaj ankaŭ aliajn gravajn materialojn por diskonigi la internacian lingvon.

En la jaro 1933 Doktoro Odo Bujwid vizitis Andaluzion. Li elektis taŭgan monaton por tiu vizito, tiel li

vizitanto estis en la sevila turo dum unu horo por rigardi la mirindan panoramon de la urbo. Nokte, ili vizitis la tipan kvartalon *Santa Cruz*. La sekvantan tagon la pola doktoro vojaĝis en Kordovon, tie same li estis akceptata de kelkaj kordovaj samideanoj.



Esperantistoj en la Sevila Foiro

venis en Andaluzio en la monato aprilo. Li alvenis en Sevilo per la ŝipo *Polonia*, atendis lin ĉe la sevila haveno la tiama prezidanto de la Sevila Grupo D-ro Rafael Fiol, la aktiva samideano kaj UEA-delegito en la urbo Karolo Martínez kaj germana samideano Dopp, kiu ankaŭ troviĝis en Sevilo en tiuj tagoj.

La sevilaj akceptantoj eniris en la ŝipon mem por saluti la vizitanton, kiu profitis tiun okazon por montri al aliaj vojaĝantoj la taŭgecon de internacia lingvo, kiu utilis por subteni kontaktojn en kiu ajn urbo en la mondo. D-ro Bujwid kaj la sevilaj akompanantoj vizitis unue la Parkon de María Luisa, kaj tie la konstruaĵojn de la okazinta Iberoamerika Ekspozicio. Poste, ĉiuj ili supreniris la Hiralidon. La pola

Reveninte en Sevilon tiun saman tagon, la pola profesoro, kune kun kelkaj sevilaj esperantistoj vizitis la aprilan foiron. Ili eniris en kelkajn barakojn, ili ankaŭ ĝuis tipajn dancojn kaj kantaĵojn. La lumo, ĝojo, koloroj, virinoj en tipaj vestoj, kantoj, dancoj, floroj kaj la muziko faris la scenojn neforgeseblaj, laŭ oni skribis tiam raportisto. Laŭdire, la profesoro eĉ decidis gustumi la andaluzian vinon, fine li esprimis sian koran dankon pro la akcepto en la urbo.

Sendube temis pri neforgesebla vizito de elstara sciencisto, kiu ne dubis uzi esperanton por ĝui bonegan momenton en la vivo, eĉ vivindan se li vizitis en aprilo la urbon Sevilon.



$$E = m c^2$$

Scienca Angulo

Kioma horo estas... sur la Luno?

Respondi la demandon pri kioma horo estas sur nia natura satelito ne estas simpla afero. Tiel, difino pri kio estas sekundo estas sama kie ajn, tamen la teorio de la relativeco asertas, ke horloĝoj estas pli malrapidaj tie, kie gravitaj kampoj estas pli fortaj. Sciate, ke gravito sur la Luno estas mapli forta ol tiu de la Tero, do, luna horloĝo gajnos 58'7 mikrosekundojn ĉiu 24 horoj. Kaj ne nur tio, se oni komparas horloĝon ĉe la Tero kun alia kiu troviĝus sur la luna surfaco, ties rapideco dependos de ĝia pozicio sur la luna surfaco, kaj tio okazas pro la rotacio de la luno.

Tamen, difini kioma horo estas en la Luno estas tute necese, se oni deziras sendi novajn spaco-ŝipojn kaj eĉ konstrui homan bazon sur nia satelito. Tiel, komunikoj kaj navigado de tiuj ŝipoj necesas konkretigi tute ĝuste la horon de kiu ajn elemento sur la Luno.

Ni pensu, ke spaco-misio sur la Luno estas mezurata laŭ surteraj horloĝoj, sed la diferenco inter tempo-mezuro sur nia planedo kaj sur nia satelito, eĉ se malgranda, povas okazigi problemojn al tiuj aparato kiu, sur la luno, ricevas ordonojn el la tero, imagu la konsekvencojn de tiu



malgranda eraro dum surluniĝo de spaco-ŝipo.

Kun la celo solvi ĉi tiun aferon, usona agenco NASA studas pridifini la, tiel nomata, Kunordigitan Lunan Tempon, temas pri mezuro ekvivalenta al surtera Universala Tempo Kunordigita (UTC ekster esperantujo).

Sed la tasko ne estos simpla, se ni scias, ke sur la Luno ekzistas tagoj kaj noktoj daŭrantaj kelkajn semajnojn, temperaturoj kun grandaj ŝanĝoj kaj surfaco ne-havanta protektantan atmosferon.

Tamen, precizeco estas tute necesa, do, sciencistoj jam studas la eblecon uzi atomajn horloĝojn sur la Luno aŭ instalitaj sur orbitantaj artefaritaj satelitoj, nur tio ebligos konstantan kaj precizan tempo-mezuron.

Kaj se paroli pri tempo, same okazas kun distancoj. La mezurunuo "metro" estas difinita kiel la distanco, kiun lumo trapasas en vakuo en unu 299.792.458-ono de sekundo. Tamen, ĉi tio estas laŭ kalkuloj de la tempo en la Tero, kun nia atmosfero kaj nia gravito. Sed la mezuro ne estus simila sur la Luno kun malsimila gravito, do, kun malsimila tempo. Do, eble estos necese ankaŭ difini kio estas metro sur nia satelito.





Flamenko

La Faruko

Faruko, hispanlingve *Farruca*, estas unu el la plej modernaj flamenkaj stiloj. Ĝi aperis en la jaro 1908 kreita de Francisco Mendoza Ríos, *Faíco*, flamenka kantisto kaj dancisto (1870-1938). Laŭdire, la vorto faruko devenas el la araba «قوراف» (*faruk*) kies signifo estas kuraĝa. *Faíco* popularigis ĉi tiun stilon en sia flamenka spektaklo, tiel baldaŭ partoprenantoj en tiuj prezentoj petis ĉi tiun novan stilon.

Kvankam *Faíco* estis la unua flamenka kantisto, kiu ludis ĉi tiun kantaĵon, oni diras, ke ĝi devenas de antikvaj kantaĵoj de Galegio kaj Asturio, tamen reale ĝi estas pli simila al kadizaj tangoj.

Se temas pri kantaĵo, la faruko ofte komenciĝas per la onomatopeo *tran-tran-tran-tran-treiro* kaj poste estas kantata koplo kun 4 oksilabaj versoj, rimantaj dua kaj kvara el ili. Dum la komenco la sono de la gitaro memorigas kadizajn tangojn. Tamen, la faruko ĉefe estas danco, ĝi estas sobra, evitanta ĉiajn superfluaĵojn kaj tre eleganta.

Dum la dancado, ŝuoj klakas intense, pro tio la faruko estas danco



Francisco Mendoza Ríos, *Faíco*
1870 ~ 1938

farita de viroj kaj se temas pri virinoj ili devas uzi pantalonojn por montri la rapidecon kaj la sonon de siaj ŝuoj. Faruko estas dancata ĉe tre malgranda spaco kaj ofte akompanata de fingroklakado.

Grandaj kantistoj en ĉi tiu flamenka stilo estis El Mochuelo, Manuel Pavón kaj Pepe Marchena, kaj se paroli pri gitar-ludistoj elstariĝas Niño Ricardo kaj Luis Maravillas. Ankaŭ artistinoj estis grandaj dancistinoj en la faruka stilo, kiel Tía Juana, la Faraona kaj María de Albaicín.

Farukaj kantaĵoj:

*Malbenataj la doloroj,
ja kaŭzataj ĉefe de vi.
Je vi mi sentis adoron,
sed vi neniam amis min.*

*Per ĉi tiu kanta faruko
jen dezir' sciigita de mi:
ke homoj en sia konduko
bone restu kaj vivu en feliĉ'.*



José Menese kantas farukon en la jaro 2008
Videblas ĉe

<https://www.youtube.com/watch?v=5kyIr38J0Ks>

Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto *Espinosa* super la rivero Darro en Granado - 17-a jarcento



Fervojista Angulo

La fervoja muzeo de

La Roda de Andalucía

La Roda de Andalucía estas vilaĝo en la provinco Sevilo. Ĝi disponis pri stacidomo, inaŭgurita en la jaro 1865, kaj tra ĝi pasis la fervoja linio inter Kordovo kaj Malago. La Roda de Andalucía ludis gravan rolon kiel fervojan nodon ĝis la jaro 1992, tiam nova linio devojigis la vagonarojn ĝis stacidomo en Fuente de Piedra. Definitive, en la jaro 2013, vagonaroj inter Kordovo kaj la malaga urbo Bobadilla ĉesis trapasi kaj halti ĉe la stacidomo de La Roda de Andalucía.

Ĉi tiu riĉa fervoja historio en la vilaĝo faciligis oftajn renkontiĝojn de eksaj fervojistoj, kiuj loĝis en la urbo. El tiuj paroladoj inter tiuj kiuj laboris en la fervoja mondo aperis ideo, kiu

fine realiĝis en la jaro 2007, la fondiĝo de fervoja muzeo, la sola ekzistanta en Andaluzio, kaj nuntempe unu el la plej vizitataj muzeoj en la Suda Sevila Siero.

La muzeo troviĝas ĉe konstruaĵo kun du etaĝoj. Sur la unua videblas objektoj koncernantaj la fervojojn, kiel, uniformoj de fervojistoj, bilet-aŭtomatoj, libroj, fotografaĵoj ktp. Ankaŭ la ĉefa allogaĵo de la muzeo: simulilo de ŝoforejo de lokomotivo, ĉi tie vizitanto povas dum kelkaj minutoj agadi kiel ŝoforo de la vagonaro kaj ekigi diversajn fervojajn itinerojn.

Antikva fotografaĵo de lokomotivo kaj fervojistoj en la stacidomo de La Roda de Andalucía



Sur la dua etaĝo de la muzeo troviĝas reprodukto, je malgrandigita skalo de Andaluzio je la fervoja vidpunkto. Tra ĝi cirkulas maketoj de antikvaj kaj modernaj vagonaroj.

Ĉe la korto de la domo, kie troviĝas la muzeo, utilas por montri realan trak-nivelan pasejon. Tie ankaŭ estas eble vidi fervojajn signalojn kaj trak-forkon.

fervojista@esperanto.ac

<https://hafe-19.websself.net>

TTT-paĝo de Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj



Granda centra maketo ĉe la fervoja muzeo




Trak-forkoj, uzitaj por direkti trakveturilojn de unu trako al alia.



Fervoja ilaro

LA VIRO EN LA SARKOFAĜO DE LA MUMIO !



Sarkofago de antikva egipta mumio povas esti taŭga
loko por kaŝi sin. Tamen, foje ...
aferoj ne estas tiel, kiel ili aspektas !

Stan Lee

S. DITKO

*Rabistoj pasas la duonon de sia vivo en fuĝo.
Komprenble, Roko Rank' ne estas escepto.*







Mi ankaŭ promesis malfermi
la sarkofagon, tuj post ilia
foriro.



Vere, mortalo, viaj persekutantoj
neniam trafos vin.



*Certe, Roko ne ŝajnas esti tre feliĉa,
malgraŭ ke li ne estis kaptita...*



*Eble li rimarkis, ke li neniam
povos reveni...*



*Ĉar li ĵus vidis, ke la sola maniero
eskapi el la persekutantoj...*



*estis eniri en mondon por helpi konstrui la lokon,
kiu devus esti la eterna ripozejo de la mumio!*



nun ni

junularaj paĝoj



AJEU ekmarŝas

La asociación juvenil esperantista de Andalucía se pone en marcha.

Kiel informite sur pasintaj numeroj de nia revuo, grupo de andaluziaj junuloj parolantaj aŭ simpatiantaj la internacian lingvon esperanton decidis fondi junularan asocion en Andaluzio sub la nomo: "Asociación Juvenil Andaluza de Esperanto", kun traduko en esperanton kiel "Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo".

Tiel, la pasintan 20-an de novembro 2024 la asocio jam ekmarŝis kaj ĉio jam estas preskaŭ preta por peti la leĝan oficialigon ĉe la Andaluzia Registaro. La fondanta estrara kunveno estas formata de:

Prezidanto: Alejandro Burgos Escalante.

Vicprezidanto kaj Sekretario: Juan Díaz Casado.

Kasisto: Yousef Hamdi El Farouki.

Voĉdonanto: Alejandro Pinos Cabello

Celoj de la nova junulara asocio estas:

- a) Stimuli kaj disvolvi la internacian lingvon esperanton kaj ties kulturon.
- b) Kunordigi la agadojn de gejunuloj parolantaj esperanton en Andaluzio.
- c) Informi pri la nuntempaj lingvaj problemoj.

Por atingi tiujn celojn la nova junulara asocio plenumos jenajn agadojn:

- 1) Eldoni kaj publikigi propran junularan informilon en esperanto.
- 2) Favorigi kontaktojn inter la membroj de la asocio.
- 3) Okazigi kursojn de la internacia lingvo esperanto.

Andaluzia Junulara Esperantisto-Unuiĝo - AJEU

Esperable, ĉio estos preta por la jaro 2025. Dum la unuaj monatoj aperos la unua numero de la nova bit-revuo "La Suno Andaluzia", eldonita por la junaj andaluzoj scipovantajn esperanton. Kaj dum-somere, se la projekto sukcesos, povos okazi semajnfina renkontiĝo junulara en tipa andaluzia loko, kaj ne nur por lerni kaj praktiki la lingvon, sed ankaŭ por amuziĝi kaj travivi aventurojn en la naturo.

Kompreneble, ni pli-informos baldaŭ.

Kontaktu kun: ajeu@esperanto.ac



La Asociación Juvenil Esperantista de Andalucía -AJEU- se pone en marcha. El pasado 20 de octubre tuvo lugar su asamblea fundacional y ya se han aprobado los estatutos. Recuerda que si eres menor de 30 años, hablas esperanto o simpatizas con el idioma, puedes pertenecer a esta asociación. Nuestros objetivos son los siguientes:

- a) Fomentar la lengua internacional esperanto y su cultura.*
- b) Coordinar las actividades de los jóvenes esperantistas en Andalucía.*
- c) Informar sobre los problemas lingüísticos actuales.*

Y para su consecución se desarrollarán las siguientes actividades:

- 1) Editar y publicar un boletín informativo.*
- 2) Realizar actividades para fomentar la cohesión de los miembros.*
- 3) Impartir cursos de esperanto.*

Esperamos que todo esté listo para empezar a trabajar en el año 2025, así que si te gusta la idea y tienes menos de 30 años no lo dudes, contacta con nosotros:

ajeu@esperanto.ac

ŜAKO

La mato de Legal



Ni tute ne konsciis pri la granda intereso ekzistanta en Esperantio pri ŝakludo. Tiel, post la apero de ĉi tiu nova rubriko en la revuo, ni ricevis pli ol 20 leterojn de legantoj, kiuj apogis la ideon informi pri ĉi tiu antikva ludo en esperanto. Kompreneble, ni ne estas fakuloj pri la temo, tamen ni interesiĝas je la ludo, kaj ni vidas ke tiu intereso ankaŭ ekzistas por dudeko da legantoj. Do, ni daŭrigu la rubrikon.

Ĉi-numere ni parolos pri la koncepto "ofero", tio estas, movo per kiu la ludanto konscie proponas al la rivalo eblecon akiri materialan avantaĝon, dum kio li volas por la oferita materialo akiri avantaĝon de alia speco, ekzemple atakon.

Akceptita ofero kondukas en profiton, kiu nomiĝas "kombino". Kombinoj estas ofta objekto de studado kaj admiro inter ŝakludantoj.

Eble, la plej elementa ofero, eble ankaŭ la plej antikva estas konata kiel "La Mato de Legal". Nomiĝas tiel, pro la fakto ke Kermur Siré de Legal, franca ŝakludanto de la 18-a jarcento, plenumis ĉi tiun maton unuafoje okaze de ludo kontraŭ Saint Brié en la jaro 1750.

Legal renkontiĝis ofte ĉe la kafejo "La Régence" en Parizo. Tiu loko fariĝis pro la ĉeesto de Legal kaj aliaj ŝakludantoj la *ŝakluda Mekko*. Tiuokaze Legal oferis sian damon dum la unuaj movoj de ludo. La kontraŭlo akceptis la oferon, temis pri la plej grava peco de la ludo, do, la materiala avantaĝo de la ludisto kiu sukcesas preni la damon de la alia ludanto estas enorma. Tamen, li ne sciis, ke tiu ofero favoris nepran maton nur post kelkaj movoj. Ni vidu kiel okazigi *la maton de Legal*.



Kermur Siré de Legal
1702 ~ 1792



1. e4, e5. *La ludo komenciĝas per tipa eliro de ambaŭ peonoj de reĝo.*
2. Kc4, d6. *Blankoj elirigas sian kurieron kun la celo okupi la centrajn kvadratojn, nigroj sin defendas pere de eliro de la peono antaŭ la damo.*
3. Ĉf3, Kg4.



Jen la pecoj sur la tablo post 3. Ĉf3, Kg4. Blankoj okupas aŭ minacas centrajn kvadratojn, tamen nigroj minacas la blankan damon per sia kuriero. La blanka ĉevalo ne povas moviĝi, se male, la nigra kuriero povus kapti la blankan damon.

Ni vidos okaze de unu el la venontaj movoj, ke "nekredeble" blankoj movas sian ĉevalon, ili ofertas sian damon al nigroj!

4. Ĉc3, g6. *Blankoj decidas elirigi la alian ĉevalon. Kaj poste...*
5. Ĉxe5, Kxd1. *Blankoj movas la ĉevalon kiu protektas la damon. Nigroj akceptas la perdon de peono, sed ili kaptas la damon!*



Post 5. Ĉxe5, Kxd1

6. Kxf7+, Re7

7. Ĉd5++ *Blankoj venkas.*



Fina pozicio post 7. ĈD5++
Blankoj oferis sian damon, tuj poste ili venkis ++



Andaluzia Kuirarto

"Porra" de Antekero kun oranĝoj

La tradiciaj popolaj receptoj en Andaluzio havas kiel bazojn la nutraĵojn, kiuj estas eble trovi en ĉiu sezono. Tiel, kiam dum-vintre ne estis eble trovi tomatojn, la diversaj gazpaĉoj devis uzi aliajn legomojn aŭ fruktojn.

Ĉi-numere, ni prezentos antikvan version de la *porra* de Antekero, kiu povus esti konsiderata kiel la gazpaĉo de tiu bela urbo en la malaga provinco. Tamen, por ĉi tiu versio oni uzas oranĝojn, anstataŭ tomatojn.

Jen la ingrediencoj por 4 homoj:

- Pano (500 g.) prefere iom mola.
- 2 ajleroj.
- Oranĝo-suko (½ litro)
- Raspajoj de oranĝo (1 kulereto).
- Oliv-oleo (150 ml).
- Malvarma akvo (se necese).
- Malmole kuirita ovo.
- Ŝinko (pecetoj).
- Salo.



Ajlo / ajlero



Ovo (malmole kuirita)



Salo



Oliv-oleo



Pano



Raspajoj de oranĝo



Oranĝo-suko

Jen la preparado:

1) Trempu la panon en la oranĝo-sukon, aldonu ankaŭ la raspajojn de oranĝo. Post sufiĉe bona trempado, dispecu la panon. Enmetu enen de aŭtomata kirlilo (miksilo) la panon, oranĝo-sukon, salon kaj la ajlerojn.



Pecetoj de ŝinko



Malvarma akvo



Uzu aŭtomatan kirlilon por miksi ĉiujn ingrediencojn.

2) La rezulto de la miksaĵo devas aspekti kiel ne-densa kremo. Se tro densa, aldonu iom da malvarma akvo. Sen ĉesi funkciigi la kirlilon, aldonu oliv-oleon laŭ fajna flueto kun la celo atingi emulsion.

Dum la miksaĵo, funkciigu la kirlilon en la komenco malrapide, iom post iom akcelu ĝin. La miksaĵo devas daŭri kelkajn minutojn.



La rezulto de la miksaĵo devas esti glata kremo.

3) La porra de oranĝoj de Antekero estas prezentita sur ceramikaj bovloj. Sur ĝi oni povas meti malmole kuiritan ovon (despecigitan) kaj pecetojn de ŝinko, simile al la kordova salmoreho.



Aldonu pecetojn de ŝinko aŭ/kaj malmole kuiritan ovon sur la kremo.



La porra de oranĝo de Antekero povas esti la unua plado, aŭ akompani aliajn manĝaĵojn, ekzemple viandon. Malsimile al aliaj gazpaĉoj, ne uzu vinagron, ĉar la oranĝo jam alportas sufiĉe da acideco.

BONAN APETITON !

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La stelo de la deziroj en la Moskeo de Kordovo

Ĝi estas konata kiel la stelo de la deziroj de la Moskeo de Kordovo kaj, laŭdire, tiu, kiu eltrovas la lokon kie ĝi situas, vidos siajn dezirojn atingitaj. Nu, temas pri bela tradicio, kvankam temas simple pri fosilio, tio estas, natura muldaĵo de vivulo konservata en petro.

Poste, tiu petro estis uzata de masonisto por konstrui la bazon de la Moskeo de Kordovo. Tutcerte, en tiu tempo la fosilio ne estis videbla, tamen erozio forigis parton de la materialo de la petro kaj tio modifis ĝian reliefon. Do, aperis fosilio kun stela formo nuntempe facile videbla.

Rilate la fosilion mem, ĝi temas pri plata eĥino aŭ sabloehino (*Clypeaster*). Ĉi tiuj eĥinoj aperis dum la Meza Eoceno, tio estas antaŭ 40 milionoj da jaroj, kvankam ili poste amase disvastiĝis dum la Supera Mioceno, antaŭ 10 milionoj da jaroj. Nuntempe ĉi tiu genro troveblas ĉe varmaj maroj.

Tutcerte, la apero de ĉi tiu fosilio kun stela formo post erozia proceso, povus esti komprenata el la popola vidpunkto kiel afero mirakla. Pro tio,



Stelo de la deziroj en la Moskeo de Kordovo

ĝi estas konata kiel *la stelo de la deziroj*. Laŭ sciencistoj, la fosilio de la karapaco troviĝis sub maldika tavolo el kalko, kiu, iom post iom, malaperis. Temas pri geologia efiko konata kiel *veterdisfalo*, dum kiu petroj estas disfalitaj pro rekta eksponiĝo al atmosferaj influoj. Tiel, subite la kalka tavolo malaperis kaj tiam estis videbla fosilio.

Do, temas pri proceso formata de antaŭ multaj jaroj. Sed eble... bonŝanco estas je nia dispono de tiom da tempo kaj pro tio, multaj homoj alproksimiĝas al tiu loko por vidi la stelon de la deziroj de la moskeo de Kordovo.



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2								
3				■				
4								
5					■			■
6		■				■		
7							■	
8		■			■			

HORIZONTALALE

1. Persono, kiu ritme movas la membrojn, ordinare kun akompano de muziko.
2. (*Plurale*) Tiu parto de la horizonto, ĉe kiu la suno ŝajne leviĝas.
3. (*Sen la lasta vokalo*) Ago de tiu, kiu translokiĝas sur aŭ en la akvo per movoj de membroj aŭ de korpoparto. ■ Korta birdo.
4. (*Inverse*) Ŝarĝi nemoveblaĵon kiel garantiĵon por monŝuldo.
5. Dika modluro kun duoncirkla profilo ĉe la bazo de kolono. ■ De tute ne difinita speco
6. Sur la aŭtomobiloj de Aŭstrio. ■ Membro. ■ Partikulo, esprimanta, ke oni malakceptas aŭ rifuzas ion.
7. Mallonga muzikpeco, uzata en reklamo aŭ kiel enkonduko al radia aŭ televida programoj. ■ En la antikva Romo, kvindek.
8. Substantiva finaĵo. ■ Substantivaj finaĵoj. ■ Virino.

VERTIKALE

- A. Ĉiu kono, kiun oni posedas por solvi problemon.
 B. Orienta brando. ■ En la italaj aŭtomobiloj.
 C. Enloĝanto de afrika ŝtato.
 Ĉ. (*Inverse*) Sufikso esprimanta kvaliton aŭ staton de io. ■ Polinezia ŝtato.
 D. Kolora likvo por skribi. ■ Konjunkcio esprimanta diferencon.
 E. Haltigi maŝinon. ■ (*Inverse*) Objekto, afero, ideo.
 F. (*Sen la lasta vokalo*) Enloĝanto de azia ĉefurbo. ■ Mallongigo de unu el la kvar ĉefpunktoj.
 G. (*Inverse*) Duonpioĉo, konsistanta el ligna tenilo kun perpendikla plata aŭ kurba klingo kaj uzata por malkompaktigi la grundon aŭ sarki trudherbojn. ■ Hela biero.



SOLVOJ AL LA KRUCVORTO DE LA PASINTA NUMERO

K	A	R	A	B	E	N	O
O	M	A	Ĝ	O	■	U	N
B	O	G	O	T	A	N	O
O	N	T	■	E	T	■	D
L	I	I	S	L	U	M	E
D	A	M	■	■	R	A	C
O	K	O	Ŝ	I	T	R	A
J	O	N	I	F	S	I	M

A
 L A
 A L O
 L A N O
 L I A N O
 L A T I N O
 A N T I L O J
 T A N I L O
 L I T O N
 T I L O
 L I O
 L I
 I

Rebuso



Hispana Provinco

Humuro



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





El 110º Congreso Universal de Esperanto se celebrará en la
ciudad checa de Brno

del 26/julio/2025 al 02/08/2025.

El tema central del encuentro es:

**Esperanto y tecnología,
puentes de paz y confianza entre los pueblos.**

Más información en:
<https://uk.esperanto.net/2025/>